# *UNASUR raportos pri sia paca misio en Venezuelo.*




La portempa prezidanteco de la Unui?o de Sudamerikaj Nacioj (UNASUR) raportos hodia? pri la rezultoj de sia vizito al Venezuelo, la? informis la ministro pri eksteraj rilatoj de tiu lando, Elías Jaua en la televidkanalo venezuela.
Jaua sciigis ke la ?tatestro, Nicolás Maduro akceptis la multnacian delegitaron en la prezidenta palaco de Miraflores kaj dankis al ili pro la vizito kaj "la sindedi?o kaj streboj faritaj ene de malpli ol 48 horoj por kunsidi kun la plej vasta diverseco de sektoroj sociaj, politikaj, ekonomiaj, studentaj, organiza?oj pri homaj rajtoj kaj politikaj partioj, kaj de la revolucio kaj de la opozicio".
La ministroj pri eksteraj rilatoj de la suda bloko, klarigis al la prezidento en formo sinteza la rezultojn de sia agado kaj transdonis al li grupon da rekomendoj kiuj estis bone akceptitaj de la venezuela prezidento Nicolás Maduro

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/18723-unasur-raportos-pri-sia-paca-misio-en-venezuelo

# Radio Habana Cuba